



estas ĉiumonata gazeteto por Esperantistoj en Halifax-Dartmouth,
Upper Rawdon kaj aliloke en Nov-Skotio (kaj ankaŭ por la mondo).

Numero 252

Aprilo, 2007

Laborantoj:

Bob Williamson — Redaktoro, preskontrolisto

Stevens Norvell — Kompostisto

Reni Porter — Presisto, enpoŝtigisto, kontisto

Sendu leterojn kaj artikolojn al:

Bob Williamson

329 Poplar Drive

Dartmouth, Nova Scotia

KANADO B2W 4K8

bob.williamson@ns.sympatico.ca

Sendu abon-monon al:

Reni Porter

71 RidgeValley Road

Halifax, Nova Scotia

KANADO B3P 2E5

Abona kosto por Kanado estas \$8, por Usono \$12, kaj por aliaj landoj estas \$20

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

PLUAJ PENSOJ PRI ESPERANTISMO KAJ MULTLINGVISMO

Mi diskutis kaj retmesaĝis kun pluraj homoj pri tiu temo, kaj konstatas kun miro, ke ĉiu havas pri ĝi opinionon tute malsaman ol la aliaj! Kaj neniu (nek mi, mi devas agnoski) tute facile akceptas, ke aliaj povus pensi pri tio ja malsame ol li. Permesu al mi komenti la de mi tute neatenditajn argumentojn proponitajn de s-ro Brozovsky (vidu: *Inter Ni*, numero 251).

Li skribas: “Por lerni la anglan lingvon sufiĉe bone por bonprofite uzi ĝin inter denaskuloj (sen diskriminacio), necesas dediĉi sian tutan lingvan vivon al ĝi, forĵetante laŭeble siajn antaŭajn lingvojn. Tiel la angla lingvo forpuŝas aliajn lingvojn.”

Mi studis plurajn lingvojn kaj dirus, ke ĉiuj naciaj lingvoj iamaniere tiom malfacilas, ke nur malmultegaj nedenaskuloj sukcesas plene regi ilin. La angla ne pli malfacilas ol la franca, ekzemple. Tamen, en Francujo, enmigrintoj ofte multe pli bone parolas la francan ol enmigrintoj en Usono aŭ Kanado la anglan; ial Francujo pli efike asimilas homojn al sia propra kulturo. Mi devas aldoni, tamen, ke, en dulingva medio (en Montrealo, ekzemple), kelkaj homoj fakte sukcesas bone regi ambaŭ lingvojn – simple ĉar ili ambaŭ lingvojn junaĝe lernis kaj daŭre uzis. Same okazas en Svislando, Belgujo, Bharato ktp.

Sed la malfacileco de la angla neniel eksplikas, kial la angla estas nun mondscale la preskaŭ nura internacia lingvo de scienco, komerco kaj internacia politiko. Kompreneble, grava kaŭzo estis la granda – iam kreskanta, nun malkreskanta – influo de Usono en mondaj militaraj, ekonomiaj, sciencaj, teknikaj, politikaj aferoj. Sed alia same grava kaŭzo estis, ke, samtempe kun tiu pligrandiĝado de la usona influo, aferoj ĉiuspecaj tutmondiĝadis. En ĉiuj kampoj oni pli kaj pli mondscale

interrilatas, la neceso de internacia lingvo fariĝas pli kaj pli evidenta, kaj oni elektas la anglan, ofte ne pro iu ajn trudado fare de anglalingvaj landoj, sed simple ĉar tiu lingvo nunmomente estas la plej disvastiĝinta. Ĝia malfacileco ne helpas ĝin en tiu rolo – male. Kompreneble, anglalingvaj landoj multe profitas per tiu evoluado kaj faras ĉion eblan por antaŭenigi ĝin.

Laŭ mi, se Esperanto estus la nun reganta internacia lingvo, ĝi mondscale tiom disvastiĝus kaj diversmaniere trudus sin al ĉiulandaj popoloj, kiom la angla faras nun – alimaniere ol ĉi lasta, tamen, kompreneble, pro ĝiaj neŭtraleco kaj relativa facileco. Jes, iom pli facilas regi kaj sian nacian lingvon kaj Esperanton. Sed, en la nunaj rapide tutmondiĝantaj kondiĉoj, tio tute ne malhelpus la disvastigon de Esperanto en ĉiuj sferoj de la homa aktivado. Male, la pli granda facileco de Esperanto multe helpus kaj pli efikigus ĝian disvastigon.

Krome, ne troigendas la facileco de Esperanto. Oni devas agnoski, ke fakte malmultaj Esperantistoj bone parolas Esperanton (kaj mi bedaŭras, ke mi ne estas inter tiuj malmultaj). Ĝi ne estas tiel facila lingvo, kiel kelkaj propagandistoj emas proklami.

Sed, jes, inter la nunaj Esperantoparolantoj, multaj interesiĝas pri lingvoj. Fakte, ili ne lernintus Esperanton, se ili ne iom interesiĝus pri lingvoj. Ili plejparte ja subtenas la pluvivon de naciaj lingvoj kaj ofte deklaras favore al multlingvismo. Nu, se Esperantoparolantoj daŭre restos malplimulto en la mondo, la esperantistoj daŭre restos la bonintenculoj, kiuj ili estas nun. Tute bone! Kaj tiel Esperanto, daŭre, tre pozitive rolos sur nia Tero. Sed, ekde la momento, kiam nia ŝatata lingvo estus elektita de la monda potencularo kiel internacia lingvo, ĝi vole-nevole ĉesus esti la lingvo de idealistoj kaj fariĝus la pontlingvo de regantoj kaj riĉuloj, kaj de la amasoj manipolataj de ili. Ne la deziroj kaj idealoj de la unuaj subtenantoj de iu bela ideo determinas tion, kio okazos post ĝia venko, sed aliaj – potencegaj – sociaj kaj geopolitikaj faktoroj. Nur rigardu tion, kio okazis al la teorie bela komunisma idealo.

Tial mi diras, ke finvenkismo en la Esperanto-movado starigas gravegajn, malfacilegajn problemojn. Se Esperanto, en kazo de (eĉ malverŝajna) fina venko, ja endanĝerigus – jarcentaskale – ĉiujn naciajn lingvojn, tio gravegas! Tial

1) aŭ ni akceptu la neeviteblan malaperon de naciaj lingvoj kiel la prezon pagendan por monda paco (tiel pensas kelkaj Esperantistoj) kaj batalu por la plej rapida disvastiĝo de Esperanto,

2) aŭ ni trovu konvinkajn, praktikajn proponojn por kontraŭi la menciitajn danĝerojn por naciaj lingvoj (mi ankoraŭ neniam aŭdis seriozan proponon tian),

3) aŭ ni zorgegu, ke Esperanto plej malfrue – eĉ neniam – finvenku (ekstremraŭmisma sinteno),

4) aŭ (iom meze inter la tri antaŭaj ebloj) ni akceptu la neeviteblan malaperon de naciaj lingvoj, sed ne batalu finvenkcele, kaj dume ni daŭre flegu Esperanton kiel mondan lingvon de paco kaj egaleco, samtempe flegante naciajn lingvojn tiom longe, kiom ili daŭros.

Vanaj alarmoj? Malhavi opinion pri tio estus... malrespondece (ĉu ne?) rilate la homojn, kiujn ni deziras altiri al Esperanto. Kaj, kiu ajn estu via sinteno, ĝi influegos, almenaŭ parte, vian rilaton al Esperanto kaj nunnunan agadon en la movado – interalie vian manieron propagandi Esperanton!

Malfacilas diri, kio okazos al ni teranoj dum la venontaj jarcentoj. Mi pli kaj pli inklinas al la sinteno numero 4. Laŭ mi, kun aŭ sen Esperanto, ĉiuj naciaj lingvoj estas destinataj frue aŭ malfrue malaperi. Ni ĝuu ilin dum ili pluvivas. Intertempe, Esperanto, uzata de aktiva malplimulto en la mondo, restas valorega ilo por egal-ecaj, pacaj internaciaj rilatoj.

— Francisko Lorrain

KVIN KOMPAKTAJ DISKOJ

Kun Paroladoj De Profesoro Ivo Lapenna

Estas agrable sidi hejme ĉe komputilo kaj skribi la subajn liniojn. Samtempe mi aŭskultas la mondfaman oratoron Ivo Lapenna (1909-1987), por kiu mi siatempe (1971) interpretis dum fakaj, juraj prelegoj en la Universitato de Turku. Apude kuŝas sur mia skribotablo kompaktdiska kovrilo kun trafa foto de liaj konataj vizaĝtraĵoj. La kutima cigaredo - lia fidela akompananto - ricevis lokon en la mano de nia konata jura sciencisto. Trankvila, kolora, tre plaĉa kaj sonora voĉo kondukas min en la pasintajn travivaĵojn, kiuj freŝe revenas en mian memoron. Estas solena kaj silenta momento en la hejmo, el kiu ĉiuj aliaj membroj jam forflugis en la mondon kaj en la ĉielon. Pensflugile mi daŭrigas la dialogon kun profesoro Ivo Lapenna.

Ne eblas flankenmeti la konatan festparoladon, prezentitan en Haarlem 1954 dum la 39-a UK. „La fundamento, sur kiu kuŝas la tuta konstruaĵo de Esperanto, estas la lingvo mem. Surbaze de la genia kreaĵo de doktoro Zamenhof, ni sukcesis en nuraj sep jardekoj transformi projekton en vivantan, plene funkciantan lingvon.” D-ro J. C. Wells, prestiĝa fonetikisto el la Londona Universitato bele akcentas la signifon de tiu ĉi parolado, kiu donas modelan ekzemplon kaj entuziasmigan inspiron al ĉiuj lernantoj de Esperanto sur kiu ajn nivelo. Li mem - do prof. Wells - eklernis la lingvon kiel 16-jarulo ĝuste kun la menciita prononca vojmontrilo sur gramofona disko.

Granda ĝojo kaj plezuro plenigas min, ĉar Fondaĵo Ivo Lapenna sukcesis eldoni serion de kvin kompaktaĵoj kun 13 paroladoj de la forpasinta UEA-prezidanto kaj elstara esperantisto. Du el ili aperis jam en la jaro 2003, kaj la lastaj tri estis haveblaj de novembro 2006. Temas pri oratoraĵoj prezentitaj inter la jaroj 1954 kaj 1987 - pli ol tri jardekojn kovras la menciita tempodaŭro. Nia majstro de retoriko parolas pri komunikado kaj homaj rajtoj ĝis humaneca internaciismo. Lia elokucio elstaras. Tion jam anticipe ni scias, sed reveno al ĉi tiuj diskoj daŭre inspiras kaj

vokas al aktiva agado. Vere altrangan kaj signifan kontribuan omaĝon donacis al la Esperanto-movado disĉiploj de la granda filo el la dalmata urbo Split. Varman gratulon meritas la respondeculoj de la menciita fondaĵo - sinjorino Birthe Lapenna frontloke. Ĉi tiel oni pluportas la torĉon ankaŭ al venontaj generacioj. La alta kultura valoro ĉi-kunlige estas senduba.

Iel tre aktuala nune estas La Rezolucio de Unesko en Montevideo 1954. Ekzemple la eksa UEA-prezidanto, prof. Humphrey Tonkin detale traktas ĝiajn erojn en sia nova, tute freŝa verko sub la nomo *Lingvo kaj popolo* (2006). Nia konata kaj ŝatata movada gvidanto trovas en la afero iujn kritikindajn trajtojn. Tamen li konfesas kaj substrekas la valoron de la agado de prof. Lapenna en la urugvaja ĉefurbo antaŭ pli ol kvindek jaroj. Estas ege tikle sekvi sur la tria disko la rakontadon propravoĉan de jurista fakulo pri la streĉaj fazoj dum la Ĝenerala Konferenco de Unesko en la jam menciitaj loko kaj tempo. Ni rajtas havi diversajn opiniojn, sed ni estu honestaj en la esprimado de niaj pensoj. Volonte mi rekomendas ĉi tiun eron publikigitan en la kvindiska serio.

Reto Rossetti skribis jam 1950, kiam aperis la brila libro *Retoriko*, ke „ĉiu parolado de Ivo Lapenna estas verko de fekunda menso, prezentita kun krea spontano de vera oratoro. Ĉar li amas la Internacian Lingvon, des pli saĝe li ĝin komprenas. Ni lernu de lia saĝo.” La cititaj vortoj aktualas kaj konvene taŭgas por pledi la nunan kompaktdiskan serion, persisteme kaj fidele eldonitan de Fondaĵo Ivo Lapenna. La diskoj estas aĉetebraj ĉe UEA kaj ĉe Birthe Lapenna en Kopenhago. Estas nepre necese, ke vi mem per viaj propraj oreloj ĝuu pri klara esprimado, pri prononco tre proksima al la internacia Esperanta idealo, pri eleganta, sed simpla elekto de vortprovizo, pri perfekte formulita sintakso. Ĉi tiujn erojn emfazas prof. Wells, kiu aldonas kvintesencon detalon jene: „Ivo Lapenna mem flegis sian lingvouzon, kaj per sia ekzemplo montris al aliaj kiel fari same.” Ni sekvu la vojon de li elektitan. Agrablajn momentojn ĉe viaj aŭskultiloj.

— Jorma Ahomäki

MALFRUA AL LA LABOREJO

Li ŝajne ne kapablis ĝustatempe alveni ĉe la laborejo. Ĉiun tagon li alvenis eble kvin, eble dek minutojn malfrue. Li estis tre konscienca, tre lerta kaj tre produkt-ema. Estis la dua kariero por tiu homo, kaj pro tio la laborestro maltrankviliĝis pri tio, kion li devas fari. Finfine li decidis, ke li devas alparoli la viron kaj invitis lin en sian oficejon por kunveneto. „Arnoldo, mi devas diri al vi, ke mi ŝatas vian diligentecon, sed via malfrueco ofte ĝenas.” „Jes estro, mi konscias pri tio, kaj mi traktadas tion.” „Nu, bone. Tion mi ŝatas aŭdi. Tamen, estas iom strange, vi alvenanta malfrue. Mi scias, ke vi jam emeritiĝis de la Mararmeo. Kion oni diris, se vi alvenis malfrue tien?” „Ili diris, **“Bonan matenon, ĈEFO”**.”

